Ernst Anschütz,

# Abio ho

*tradukita de Richard Schulz*

Abio, ho! Abio, ho!
Vi estas tre fidela.
Vi estas verda en somer',
En vintro kaj en primaver'.
Abio, ho! Abio, ho!
Vi arbo tre fidela.

Abio, ho! Abio, ho!
Vi multe al mi plachas!
Vi estas ja Kristnaska ghoj',
Vi arbo apud negha voj'!
Abio, ho! Abio, ho!
Vi multe al mi plachas!

Abio, ho! Abio, ho!
Min vi verdul' instruas:
Ke konstantec', ke la esper'
Konsolas nin en la mizer'.
Abio, ho! Abio, ho!
Min vi verdul' instruas.

...

Ernst Anschütz,

# O abies

*tradukita de N. N. 28*

O abies, o abies,
Quam es fideli fronde!
Aestivo vires tempore
Ac tum, cum ningit hieme.
O abies, o abies,
Quam es fideli fronde!

O abies, o abies,
Quantopere me juvas!
Quam saepe jam placebas mi
Natali die Domini!
O abies, o abies,
Quantopere me juvas!

O abies, o abies,
Me vestis vult docere,
Ut spes det ac constantia
Et vires et solacia.
O abies, o abies,
Id vestis vult docere.

...

Ernst Anschütz,

# Abio vi

*tradukita de Paul Gottfried Christaller*

Abio vi, abio vi,
kun foliar fidela!
Vi verdas ne nur en somer',
sed eĉ dum vintra neĝa ter'.[2]
Abio vi, abio vi,
kun foliar fidela!

Abio vi, abio vi,
Al mi tre multe plaĉas.
Ho, kiom ofte ĝojis mi
en la kristnaska bril' be vi!
Abio vi, abio vi,
Al mi tre multe plaĉas.

Abio vi, abio vi,
instruon donas bonan:
Espero kaj la konstantec'
konservas forton de junec'.
Abio vi, abio vi,
instruon donas bonan.

...

[2] aŭ:
sed eĉ dum vintra neĝ-veter'.
Tiun version de tiu ĉi linio mi, Manfred Retzlaff, iam aŭdis.

*Traduko de la Germana poemo "O Tannenbaum" de* Ernst Anschütz *(∗1780-10-28 – †1861-12-18) en Esperanton de* Richard Schulz *(Rikardo Ŝulco, ∗1906-07-12 – †1997-09-26).*

*Arg-593-1193 (2013-02-26 15:10:12)*

*Tiu chi traduko aperis en 1982/12 en la n-ro 42 de la Vestfaliaj Flugfolioj eldonitaj de Rikardo Shulco (Richard Schulz). Tie estas indikitaj ankau la muzik-notoj. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz`*.*

*Traduko de la Germana poemo "O Tannenbaum" de* Ernst Anschütz *(∗1780-10-28 – †1861-12-18) en la Latinan de N. N. 28.*

*Arg-593-1194 (2012-12-13 12:21:43)*

*Tiu ĉi latinigo troviĝas en la retejo* `http://ingeb.org/Lieder/OTannenb.html`*.*

*Traduko de la Germana poemo "O Tannenbaum" de* Ernst Anschütz *(∗1780-10-28 – †1861-12-18) en Esperanton de* Paul Gottfried Christaller *(∗1860-08-21 – †1950-12-31).*

*Arg-593-1455 (2012-12-13 18:37:04)*

*Tiu ĉi esperantigo de la kanto troviĝas en la retejo* `http://kantaro.ikso.net/das_deutsche_lied_in_esperanto` *sub* `http://kantaro.ikso.net/abio_vi`*. Ĝi aperis unuafoje en la kant-libro SSas e*